SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

616.988.6 : 615.7

## MIKOSIZO FUNGOIDA — LA POPOLMALSANO KAJ ĜIA KURACADO.

(Ladislao Molnar, Hungario)

Almenaŭ duono de la homoj suferas pro ĝena haŭtmalsano, kies devenon kaj kuracadon oni apenaŭ konas. Ofte opinias ĝin la homoj ekzemo. Sed tiu malsano multe diferencas de la ekzemo kiu ne estas infekta kaj tiun kaŭzas alia afero.

Tiu malsano estas la Mikosizo fungoida, kies infektiĝa tereno estas plej ofte la piedoj, respektive la fingroj de la piedoj. Precipe la fermitaj partoj inter la fingroj estas infekiĝemaj. Tiu haŭtmalsano bezonas malsekecon, infektigajn mikrobojn kaj ne ventumitan terenon. La infektiĝo okazas plej ofte en publikaj banejoj, kies plankoj jam estas infektitaj de nudpiedaj homoj jam suferantaj pro mikosiza malsano. Aŭ ofte oni infektiĝas de pruntenprenitaj ŝuoj. Mikosizo fungoida ofte devenas de dombestoj (ĉevalo, bovino, ktp.) precipe sur la hararkovrita kapo. Tial mi pritraktas pli detale la Mikosizan infektiĝon sur la piedoj ĉar tiu estas ankoraŭ pli ofta kaj la ebleco de infektiĝo estas pli granda.

**Simptomoj:**

Post kelkaj tagoj kiam oni jam estas infektita, la haŭto inter la fingroj komencas blankiĝi kaj kelkloke kreiĝos fliktenetoj, kiuj pli poste kreviĝas. Tiuj fliktenetoj enhavas senkoloran fluidaĵon. Post la krevo de fliktenetoj oni sentas ĝenan jukadon sur la koncerna parto. La malsanulo malofte povas sin regi, precipe kiam dormas, tiam klopodas mildigi sian suferigan jukadon per forta gratado. La jukado iom da tempo ankoraŭ daŭros, eĉ plifortiĝos. Sed post kelkaj minutoj ĉesas kaj postrestas flamiga sento. Tiu devenas de la frotŝirita haŭtsufaco, sur kies loko vidiĝas helruĝa, ofte sanga parto. Ofte fendiĝas la haŭto inter la piedfingroj profunde.

**Kuracado:**

La plej simpla kuracado estas preventi la infektiĝon. Post uzo de la publika banejo ni sekigu per frotado la fingrojn kaj la interfingrajn haŭtsurfacojn. Post la sekigo ni seninfektigu per mikofeno aŭ por alia senifektigilo.

La diversaj mikosizaj gentoj, bezonas diversajn seninfektigajn medikamentojn. Ekzistas gentoj, kiujn jam ekstremas simpla penikado per kuireja vinagro. Sed estas uzataj diversaj fabrikaĵoj, pli kaj pli efikaj.

Tiuj estas nome: Mikozido (fluida kaj polva) alkoholaj jodoj, Mikofemo, sterogenolo ktp. Sed laŭ mia sperto la plej efika estis, kiun longa kaj multfoja eksperimento pruvis jen: (originale en la latina teksto).

| | |
|---|---|
| Sol Jodi spirit | 10,0 |
| Acidi salicyl | 3,0 |
| Acidi bensoici | 4,0 |
| Resorcini | 0,25 |
| Spir Vini dil ad | 100.0 gr. |

al penikado ekstere!

Ĝis nun ne ekzistas tute efika kuracilo, kiu forigas la eblecon de la remalsaniĝo kaj por ĉiam garantias ŝirmon, kontraŭ la obstina haŭtmalsano, sed ĉi lasta kuracilo ĝis longa tempo certigas nian bonfarton kaj resaniĝon.

Kompreneble la plej taŭga ŝirmilo estas kontraŭ la infektoj la preventado. Sed kiu jam havas la malsanon ne neglektu sed zorge kuracu ĝin, ĉar ne forgesu, krom la ĝeno, kiun la malsano kaŭzas, ĉiu fendaĵo sur la haŭtsurfaco signifas pordon por la malsanigaj mikroboj.